

# Kvara Eŭrop-Unia Esperanto Kongreso

## Oostende, 27-04 ĝis 01-05

### PROGRAMO

#### Ĵaŭdon, la 27an de aprilo

- 15.00 - 18.00 Bonvenigo de la partoprenantoj en la stacidomo kaj en la kongresejo (Feestpaleis). Jam eblas viziti diversajn budojn kaj libroservon.
- 20.00 En la kongresejo (Feestpaleis), solena inaŭguro fare de s-ro Paul Breyne, Provinco-guberniestro de Okcidenta Flandrio.
- Prezento de la tri temoj: Eŭropa Unio, Monda edukado (Interkulturo) kaj Ekologio, ŝlosilo de la tria jarmilo.
- Muzika pribriligo fare de Karlo Dohnal, Ĉeĥio, laŭreato de "Clarinetfest 1999", Ksenia Sljakhotva, violonistino kaj Dirk Ooms, piano.

#### Vendredon, la 28an de aprilo

- 07.44 Foriro al Bruselo el la stacidomo de Ostendo.
- 09.29 Alveno en Bruselo (Leopoldswijk).
- 10.00 - 12.00 Vizito al la Eŭropa Parlamentejo (nur por "funkciuloj" kiuj ensendis la registrilon en p.xxx).
- Prelegoj:
- Prof. Joseph Országh (Universitato de Mons Hainaut, Fakultato de Sciencoj (Kemia fiziko Aplikata): Internacia komunikado kaj daŭra mastrumado de la akvo, du similaj problemoj.
- Zlatko Tišljár (Maribor, Slovenio): Eŭropa identeco, ideologio kaj lingvo.
- Dialogo kaj diskuto kun eŭropaj parlamentanoj.
- Posttagmeze: promenadoj kun ĉiĉeronoj tra Bruselo, unu el la naŭ "Kulturaj ĉefurboj de Eŭropo".
- Vizito de la urbodomo (kie kronprinco Filipo kaj princino Mathilde geedziĝis).
- 17.00

# Prelegoj dum la kongreso


## *Efika internacia komunikado kaj mastrumado de la akvo kun daŭra efiko: du analogaj problemoj.*

Fare de Joseph Országh, Universitato de Mons (Belgio)  
Membro de la Komisiono pri Akvoj de la Valona Regiono

### *Resumo*

*En la daŭro de la historio, la graveco de lingvo por la eŭropa identeco fundamente preterpasas tiun de la komuna mon-unuo. La manko de unu lingvo por facile kaj egalrajte komuniki, forprenas de nia kontinento la eblecon je unueco kaj efikeco kiujn ebligas rekta parola interparolo je ĉiuj niveloj.*

*La adopto de planlingvo, kiel Esperanto, kiu enhavas la sintezon de ĉiuj eŭropaj lingvoj, kolizias kun neraciaj obstakloj de la sama tipo kiel tiuj, kiujn oni renkontas por enkonduki komunan politikon rilate al la traktado de la akvo laŭ maniero kiu havu daŭran efikon. Kvankam ili situas en tute malsamaj terenoj, tamen la problemoj de la lingvo kaj tiu de la akvo, obeas iun saman logikan skemon.*



*Kie la akvo estas koncernata, oni povas klare montri ke reorientigo de la eŭropa politiko ebligus instalii novajn teknikojn kiuj estas multe pli efikaj kaj multe pli malmultekostaj ol tiuj kiujn la eŭropaj leĝaj instancoj nun klopodos altrudi al siaj membro-ŝtatoj. Danke al la reorientigo, la ŝparoj realigeblaj, permesos forigi ĉiujn impostojn rilate akvon. Rilate la purecon de niaj riveroj, oni povus preterpasi la plej optimismajn celojn de kvalito, sen bezono de altaj elspezoj.*

*La enkonduko de komuna lingvo, kiel Esperanto, solvus je la sama maniero grandan kvanton da problemoj kiuj nuntempe multekostas kaj pezas sur la eŭropa buĝeto.*

*En ambaŭ kazoj, oni rimarkas obstaklojn samspecajn: la subteno de la lingva apatio, same kiel la senĉesa ĉeno malpurigado-purigado de la akvoj estas fontoj de profitaj enspezoj por kelkaj. Ili ankaŭ estas maniero por satigi la soifon je povo kaj superregado. ■*

## ***Eŭropa identeco, ideologio kaj lingvo***

Fare de Zlatko Tišljar

Direktoro de "Inter-kulturo", Maribor (Slovenio)


*Mi proponas al vi prelegon "Eŭropa identeco, ideologio kaj lingvo" kadre de la 4a Eŭropunia Esperanto Kongreso. En la prelego mi traktas la demandon de Eŭropa Unio iom alie ol kutime kaj tiusence ankaŭ la pozicion de Esperanto kadre de la iom ŝanĝita koncepto pri sociologio kaj lingvistiko. La bazajn ideojn pri tio eblas legi en libro "Europa Ideologio" aperinta en 1998. La libro ricevis bonegajn recenzojn kaj subvencion de Soros-fondaĵo por ĝia apero en slovena traduko. En 1999 ĝi aperis ankaŭ en germana traduko. Baze de la libro okazos en la daŭro de 2001 konferenco pri "Strategio de politikistoj de malgrandaj landoj en traktado kun EU pri egalrajteco de lingvoj". ■*

## *Renkonte al la tero kaj la homoj*

Fare de Bruno kaj Maryvonne Robineau, mondo-vojaĝantoj

*Maryvonne kaj Bruno Robineau iun tagon forlasis sian bovinfarmbienon en Maine-et-Loire (Francio). Pelita per nesatigebla scivolemo rilate la vivkondiĉojn aliloke, ili foriris por migri tra la mondo.*

*Jen bonega maniero por konatiĝi kun la homoj: partopreni ilian pezan laboron. La du vojaĝantoj elektis ekkoni la vivon de la popolo pere de la vivo de la kamparanoj. Vendante siajn laborfortojn kontraŭ manĝaĵo kaj tranoktado, ili renkontis homojn dum sia ĉiutaga vivo, kaj partoprenis en tiu vivo.*



*Dum tiu vojaĝo ilin servis la lingvo Esperanto, kiu efikis kiel vera ĉiuporda ŝlosilo dum iliaj renkontoj. Tiel ili povis viziti ĉiujn sociajn klasojn: bulgaran oficiron, japanan oficiston altrangan kaj ĉinan kamparanon.*

*Dum ok jaroj ili trairis multajn kulturojn en dek kvin landoj. Dum tiu tempo ili profunde povis trempiĝi en la specifaj ecoj de la vizitataj popoloj. Resumi tiujn spertojn en nur unu horo estas tute maleble kaj oni riskus preterrigardi la esencon. Tial la prelego miksas la prezenton de kvin landoj kun la aventuro de la vojaĝo...*